



*Estrara Komunikado EKO 2016-20 sendita el Budapeŝto, la 20an de julio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## La Jarraporto 2015 kiel aperas en la junia revuo *Esperanto*

Nia alkröĉaĵo portas al vi ilustritan version de la teksto, kiu aperas en la junia numero de la oficiala organo de UEA. La Komitatanoj jam ricevis la tekston de la raporto kiu estis oficiale submetita al ili. En la kunsido por la publika diskuto de la raporto, pliaj ekzempleroj de tiu raporto estos je dispono. Tiu dokumento entenas proksimume dek mil vortojn. La revua versio enhavas ĉ. ses mil vortojn. Ĝi estas koncizigo de la komitata raporto kaj enhavas neniun plian informon kompare kun tiu komitata raporto (krom la aldono de fotoj!). La raporto havas naŭ paĝojn da teksto, inkluzive de la financaj rezultoj, kaj kvin pliajn bildopaĝojn. Bonan legadon!

## Kleriga Lundo en la UK

La programo por la Kleriga Lundo estas atingebla ĉe la adreso:

<http://www.ipernity.com/blog/36602/4623922?t=89635&c=1&s=edit>

Informoj de la organizanto Claude Nourmont-Moon.

## Buso Nitra-Nyiregyháza de UK al la Konferenco de ILEI

ILEI organizis hungaran buson, kiu en la ferma sabato de UK transportos konferencanojn rekte de la UK al la Konferenceto. Ariĝas nun mendoj. Por aliĝi al la busvojaĝo vizitu la kunsidon de ILEI dimanĉe ekde 17.00h, la Tagon de la Lernado (marde) aŭ la ILEI-budon. Verŝajne tie eblos ankaŭ aliĝi al la Konferenco, kiu havas jam 122 aliĝintojn. La vojaĝo kostos €22, pagebla dum Nitra aŭ plejlaste ĉe eniro al la buso. Anoncota la ekirpunkto de la buso – ĉu de la sporthalo, kie okazos la fermo, ĉu de la kongresejo.



## Oratora Konkurso en Nitro

Dum la 100-a UK en Nitro denove okazos Oratora Konkurso por la junularo. La precizaj dato kaj loko estos anoncitaj en la Kongresa Libro. Rajtos partopreni ĝin gejunuloj ĝis la 30-a vivojaro, kiuj aliĝis al UK. Partopreno estas senpaga, sed la kandidatoj devos skribi anonci sin minimume unu tagon antaŭ la konkurso al la estrarano pri kulturo, Barbara Pietrzak, [bpietrzak@onet.eu](mailto:bpietrzak@onet.eu).

La junaj oratoroj povos elekti unu el la jenaj temoj:

- 1) Socia justeco – lingva justeco;
- 2) Informadika socio – ŝanco je kleriĝo (Jaro de la Lernanto);
- 3) Idea heredaĵo de Ludoviko Zamenhof (2017 – Jaro de Zamenhof);

Oni devos paroli pri la elektita temo libere, sen antaŭpreparita teksto, sed oni rajtos uzi memorigajn notojn. La maksimuma daŭro e la parolado egalas al 10 minutoj. La paroladon oni taksos laŭ la vidpunkto enhava, lingva, stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro. Kompletaj regularoj troviĝas ĉe: [http://uea.org/teko/regularoj/regularo\\_oratora\\_konkurso](http://uea.org/teko/regularoj/regularo_oratora_konkurso).

## Slovakio en la fokuso en la Jarraporto 2015



Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: [http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado\\_kun\\_LA,\\_FA...](http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...)